I. F. E. A.
ASSOCIAZIONE ITALIANA FERROVIERI ESPERANTISTI
Aderente alla INTERNACIA FEDERACIO ESPERANTISTA FERVOJISTA (I. F. E. F.);
alla UNIVERSALA ESPERANTO ASOCIO (U. E. A.) e alla FEDERAZIONE ESPERANTISTA ITALIANA (F. E. I.)
Sede Centrale: Dopolavoro Ferroviario - Piazza Calderini 4 - Bologna (Italujo)

ESPERANTO

# Informa Bulteno

ITALA FERVOJISTA ESPERANTO - ASOCIO

REDAKTEJO: Bologna - Via Donato Creti N. 61 - Tel. 59-071 REDAKTORO: Gimelli p. i. Germano

N°7 Aprilo 1955

## 40-a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO
## 30.VII - 6.VIII, 1955 BOLONJO

JUBILEA KONGRESO OFICIALA KOMUNICO

Adreso: Kongreso de Esperanto ĉe CIT, Piazza Nettuno 2, Bologna
Banko : Banca di Napoli, Bologna, konto 2824
Giro: Grupo "A.Tellini", Medaglie d'Oro 3, Bologna, 8/20620

Dua Bulteno: Jam sendita al ĉiu aliĝinto en marto.

Limdato de aliĝo: Konforme al la Kongresa Regularo de U.E.A. la L.K.K. rifuzos akcepti aliĝojn post la 30-a de junio. La aliĝiloj devos esti en Bologna je tiu dato. Je la 30-a de junio la L.K.K. fermas siajn kontojn por fari la necesajn kalkulojn prete por la kongreso. Sekve ne sendu monon al L.K.K. tiel ke ĝi atingos Bologna en julio.

Transporto en Bologna: La urbestro de Bologna jam promesis senpagan veturadon dum la kongresa semajno.

Nomigo de strato: Promesite estas, ke dum la kongreso la magistrato ceremonie inaŭguros straton kun la nomo ESPERANTO honore al la kongreso.

Jubileo: La urbestro de Bologna invitis al la Jubilea Kongreso la urbestron de Boulogne-sur-Mer, hejmo de la Unua Kongreso.

Vesteraj aranĝoj: La festoj okazos jene: sabaton - Interkona Vespero; dimanĉon - Inaŭguro de I.S.U. kaj programo de dancado por gejunuloj; lundon - Teatra Vespero (La revizoro de Gogol en traduko de Zamenhof); mardon - Kongresa Balo; merkredon - Arta Verpero (muziko) kaj gejunula programo; ĵaŭdon - libera (gejunula programo); vendredon - Jubilea Vespero.

Glumarkoj: Folio de 25 belaj, kun ora surpreso, glumerkoj - 50 lirojn, 1 rpk. Mendu ĉe la kongreso aŭ ĉe perantoj.

Loĝigado: La Loĝiga Servo informas, ke ĉiuj unulitaj ĉambroj jam estas rezervitaj. Nepre ne plu mendu sed faru aranĝon pri divido de ĉambro.

Statistiko: (ĝis fino de marto): Argentino 1, Aŭstralio 2, Aŭstrio 21, Belgujo 13, Brazilo 3, Britujo 80, Cipro 1, Danujo 36 Finnujo 46, Francujo 202, Germanujo 90, Hispanujo 5, Irlando 3, Italujo 260, Izraelo 1, Japanujo 1, Jugoslavio 54, Kubo 1, Maroko 20, Nederlando 136, Norvegujo 26, Novzelando 1, Portugalujo 6, Sarlando 1, Sudafriko 1, Svedujo 91, Svislando 25, Urugvajo 2, Usono 12. Sumo el 29 landoj 1141.
Nemembroj de UEA 23 %. Instruistoj 18 %. Gejnuloj 7 %.

Mason Stuttard, Konstanta Kongresa Sekretario

SOCI DELLA I.F.E.A., avete inviato la quota di adesione per il 1955 ? [illegible]telo immediatamente. Il Cassiere attende.

D I S S E N D O J   E N   E S P E R A N T O

R DIO ROMA - ESPERANTO - Casella Postale 320

Aprilo 1955

500 vendredon la 1.an - Nia kvincenta jubilea dissendo
501 merkredon la 6.an - Mondo esperantista
502 vendredon la 8.an - La sep paroloj de Jesuo dum la agonio
503 merkredon la 13.an - Novajoj el Italujo
504 vendredon la 15.an - La lingvo Esperanto 38 jarojn post la morto de ĝia elpensinto
505 merkredon la 20.an - Opero "Vilaĝana Kavalireco" de Pietro Mascagni
506 vendredon la 22.an - Italaj belartaj urboj: ROMO
507 merkredon la 27.an - Projekto de nova kalendaro laŭ teksto de A.Ribot
508 vendredon la 29.an - Leterkesto kaj bibliografio

Majo 1955

509 merkredon la 4.an - Mondo esperantista
510 vendredon la 6.an - La pagana kaj kristana POMPEJ
511 merkredon la 11.an - Novaĵoj el Italujo
512 vendredon la 13.an - La Tago de Bonvolo
513 merkredon la 18.an - Premiitaj kanzonoj ĉe la Festivalo de Sanremo
514 vendredon la 20.an - La 690-a datreveno de la naskiĝtago de Dante Alighieri
515 merkredon la 25.an - CAPRI, la insulo de la sirenoj
516 vendredon la 27.an - Leterkesto kaj bibliografio

La dissendoj okazas de h. 19,10 ĝis h.19,25 (laŭ M.E.T.)
Stacioj: m.31,33 = Mc/s. 9,57 kaj m.49,92 = Mc/s.6,01

Prelegas: merkrede - S.ro Luigi Minnaja
" : vendrede - Prof. ro D.ro Vincenzo Musella

La Fakestro: BLASIMME

ITALA ESPERANTO FEDERACIO — ESPERANTO-GRUPO DE MASSA

2^ ESPERANTO - INTERREGIONA KUNVENO

Hepantoj la "Ente Provinciale per il Turismo" la "Amministrazione Provinciale" la "Comune di Massa" la "Azienda Autonoma di Soggiorno di Marina di Massa" Kunhelpanto la "Associazione Culturale Massese" la 23 - 24 - 25-an Aprilo okazos en Marina di Massa la 2^ Esperanto Interregioma Kunveno.

P R O G R A M O

Sabato, 23-a Aprilo

Posttagmeze - Alveno de la partoprenantoj.
h.21,30 - Interkona vespero - Ĉe sidejo de la "Azienda Autonoma di Soggiorno en Marina di Massa".

Dimanĉo, 24-a Aprilo

h. 8 - Foriro de la kunvenantoj por autobusekskurso al la marmor-minejoj en Carrara.
h. 9 - Carrara-vizito de marmorsegejo kaj de la minejoj en Colonnata.
h.11 - Carrara-vizito de la Belarta Akademio.
h.12 - Vizito de Marina de Carrara.
h.12,30 - Oficiala Akcepto kaj honora vermuto de la "Ente Prov.Turismo".
h.15,30 - Marina di Massa, ĉe sidejo de la "Azienda Autonoma di Soggiorno" - Kunsido de la grupoj - Raporto pri la agado de la loka grupo - Prelego de S.ro Mason Stuttard K.K.S. pri la temo: "La hinstorio de la Esperanta Movado kaj de la Universala Kongreso".

h.21 – Massa – ĉe Svisa Salonego en la Prefektejo: Arta kaj distra vespero.

Lundo, 25-a Aprilo

h. 8,30 – Foriro de la kunvenantoj por autobusekskurso al "Torre del Lago" por la vizito de "Vilao Puccini"

h. 9,30 – Torre del Lago Puccini – Vizito de "Vilao Puccini".

h.13 – Marina di Massa – Komuna tagmanĝo ĉe hotelo "Italia".

h.15 – Forsalutoj kaj fermo de la Kunveno.

LA KOMITATO: Aliboni M°.Marcello – Dazzini Dr.Mario – Grosso Prof. Antonio – Lisena Prof. Pasquale – Martini Dr.Bruno

La partoprenantoj ĉe la elirejo de la stacidomo prenos publikan autobuson por atingi Marina di Massa kaj kunvenos ĉe la "Azienda di Soggiorno".

La kunvenantoj kiuj deziras tranokti en la ĉefaj hoteloj de la urbo pagos de 700 ĝis 900 £. (1 lito) 1000 ĝis 1400 £.(2 litoj) kaj 1500 ĝis 2000 (3litoj). Ili estas petataj anonci sin baldaŭ. Ĉiuj partoprenantoj ne pagos kunvenkotizon. La komuna tagmanĝo kostos 850 £.

Adreso de Loka Kunvena komitato: MASSA ESPERANTO-GRUPO-MASSA (Massa C)
Casella Postale 22 – Telf.75-56

## INTERNACIA FERVOJISTA KONGRESO
## ZURICH 8 – 13 MAJO 1955

Cirkulero al la landaj asocioj pri proceduro Malfermo kaj Prelegoj

Kompreneble ankaŭ nia LKK provos aranĝi laŭeble imponan kongreson kaj ie kaj tie ŝanĝos iom la aspekton. Tio estas la kazo por la Malfermo.Ni opinias, ke lokigo de la oficialaj gastoj, de la IFEF-estraro, de la oficialaj delegitoj de direkcioj, de la salutantoj de landaj asocioj kaj de LKK sur la scenejo havas certajn preferojn.

Kongresanoj, kiuj havas komision saluti la kongreso, ĉu de sia fervoja direkcio, de landa fervojista sindikato, de landa asocio bovolu eniri ĉe la pordo por hotelo Limmathaus maldekstre de la kongreseja enirejo, unua ŝtuparo, kie en la "ruĝa ĉambro" estos kolektiĝo plejmalfrue je la 19,50 horo. De tie rekta suriro sur la scenejon eblos.

Por reprezentantoj de fervojaj direkcioj ni konsentas paroltempon de 5 minutoj. Ni komprenas, ke li ŝatas legi tekaston, se la direkcio disponigis tian. Sed, se tio ne estas la kazo, ni petas eviti rakonton pri la fervoja reto ktp. kaj mencii preferinde la rilatojn kiujn la esperantista fervojista asocio havas kun sia direkcio.

Por salutantoj da landaj asocioj ni konsentas paroltempon de 3 minutoj maksimume. Ankaŭ tie pli gravas aludi pri via agado ol pri progresoj de via fervoja trafiko.

Bonvolu nepre sciigi al ni ĝis dimanĉe vespere la nomojn de viaj parolontoj. Vi povos multe helpi por plibonigi nian Malfermon per respekto de supraj gvidlinioj kaj ni dankas por via komprenemo.

Fakaj prelegoj. – Ni spertis, ke por propagandi nian movadon kaj kongreson, tiuj Fakaj Prelegoj estas la plej bona helpilo. Tial ni devas de jaro al jaro plibonigi tiun programeron, por ke ili fariĝu modelaj.

En la lasta IFEF-bulteno vi trovis proponon pri kongresa regularo. En la intereso de nia afero bonvolu ĝin bone studi, la parton pri la Fakaj Prelegoj ni jam aplikos en Zürich.

Temo por 1955 estas: Dungado kaj instruado de lokomotivpersonaro por vapor-elektra-kaj motor-lokomotivoj. Ni petas vis, se iel eble komisii lokomotivestron el viaj vicoj skribi la artikolon. Pli bone praktikulo prilaboru tion, ol verkado laŭ regularoj. Ne forgesu kunporti 30 kopiojn de tiu artikolo.

Gvidos tiun programeron rektorato, elektita en Verona, estas kolegoj de Jong - Örtengren - Walder. Unu el ili faros enkondukan alparolon, alia kolektos la artikolojn.

El la funda artikolo estu prenota konciza teksto por prelego en Zürich, kiu po lando daŭru maksimume 15 minutojn, pro kio ni insistas. Ni ne volas instigi vin nepre elekti la verkinton de la artikolo por prelegi, ni preferas, ke vi elektu la plej spertan oratoron el via delegacio. Bona oratoro venas preparite al la podio kaj laŭeble libere prezentas sian paroladon. Ĉu vi ne samopinias kun ni, ke estas abomeninda, se 10-12 prelegantoj sinsekve nur laŭtlegas tekston el la paperoj. En Zürich ni prelegu, ni parolu libere, forte, koncize !!!

LKK estas dankema, se ĝi ricevos ĝis dimanĉe vespere informon pri la nomo de via preleganto.

Ni certas; ke vi komprenas niajn pensojn, krei altkvalitan kongreson.

Bi Wa So No - L.K.K.

KUNVENO DE GRUPESTROJ EN BOLONIO - La ĉiujara kunveno de esperantistaj grupestroj, iniciatita de la Itala Esperantista Junularo jam de kelkaj jaroj, okazos ĉijare en Bologna la 8-an de majo. Ĝi komenciĝos je la 9,30 en la grupa sidejo, via Goito 16, la temo de la kunveno estos "La metodoj por la instruado de Esperanto", sed kompreneble oni parolos ankaŭ pri la 40-a Universala Kongreso. Ĉeestos la Prezidanto de la Itala Esperanto-Federacio, la Kostanta Kongresa Sekretario kaj reprezentantoj de la Loka Kongresa Komitato.

En la posttagmezo okazos ankaŭ kunveno de la "Strasburgo-komisiono", la komisiono de I.E.F. por Eŭropo-aferoj.

Partoprenantoj, kiuj ne povos ĝuj la dimanĉan rabaton por la fervojbileto (30 % ĝis 250 km.), povos havi 25 % rabaton pro la Bolonja Foiro.

KONGRESO DE LA ESPERANTISTA FEDERACIO DE PROVENCO EN NICE

Programo:

Sabaton la 7-an de Majo. Matene: Akcepto al la kongresanoj.

h.12,30 - Radio-intervuo al la oficialaj delegitoj en la Radio-stacio Placo Grimaldi.

h.14,30 - Ekzamenoj en la "Chambre de Commerce" 20, Bulevardo Carabacel.

h.15 - Por la nekandidatoj: Ekskurso per autobuso al Villefranche s. - mer, vizito de la malnova kvartalo, de la haveno, kaj ĉitadelo

h.18,30 - Akcepto de la Nica-Grupo. Aperitivo en hotelo Scribe 20, avenue Georges Clemenceau.

h.21,30 - Distra vespero balo en la salonoj de hotelo Scribe.

DIMANĈON la 8-an de Majo

h. 9 - Laborkunsido en la salono de"Union Coloniale" 22, rue de France

h. 9,30 - Por la ne-partoprenantoj: Trauba ekskurso per autobuso, la Kastelo, la Arenoj de Cimiez, la Rusa Preĝejo, la lanterne, la Promenejo de la Angloj.

h.11 - Solena akcepto de la Urbestraro en la Villa Massena.

h.12,30 - Festeno en la Restoracio "Prince" Quaj des Etats Unis

h.14 - Ŝipekskurso al la Princlando Monako. Vizito de la Oceanografia Muzeo. Akcepto de la Monaka Grupo en la Turisma Oficejo.

La Kongresanoj estas afable petataj sendi al la ESPERANTO-GRUPO, Palais des Fêtes, 25 rue Rossini, CCP,1107-93 Marseille, ĝis la 25-an de Aprilo, sian aliĝbultano, kun kotizo 200 frs. kaj antaupago por la luprezo de la hotelo-ĉambro 400.=frs.